# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (899) • 2013 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

La unua kristana martiro estis Sankta Stefano. Li estis akuzita, juĝita de la alta konsilistaro en Jerusalemo kaj ŝtonumita antaŭ la urbaj muroj

Pentraĵo de Vittore Carpaccio (1466–1525)



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 311 241 406; 💻 polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32
HU-1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Nygatan 10 A; 281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| "Black hole" | 27 |
| Kio estas inkunablo | 28 |
| La martiroj ten Boom | 29 |
| Pri persekutado religia | 32 |
| Skizoj pri filozofoj-kuracistoj | 37 |
| La Profilo – Václav Pospíšil | 40 |
| Kongresi ? | 41 |
| Bibliaj tagoj en Strasburgo | 42 |
| Bibliaj tagoj 2013 | 43 |
| Informetoj | 46 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Kiam mi komencas ordigi la materialon por la sekvonta numero de Dia Regno, mi ne havas klaran bildon kiel ĝi finfine aspektos aŭ kiun impreson ĝi donos al la leganto. Per kiu artikolo mi komencu la gazeton kaj kiel daŭrigu la enpaĝigon? Mi ankaŭ ne scias ĉu la materialo sufiĉos aŭ ĉu mi havos problemon elekti pro tro da kontribuaĵoj? (La lasta "problemo" estas la plej malofta.)

Sed estas interese sperti kiel la gazeto elformiĝas dum la laboro. Laŭ mia memoro mi pri la enhavo preskaŭ ĉiam estis kontenta kiam mi finfine sendis la gazeton al la presejo. Ofte mi sentas ke la artikoloj kompletigas unu la alian diversmaniere. Ĉifoje unu grava temo estas martiroj kaj persekutado, kaj antikve kaj dum moderna tempo. Kontraste estas interese legi la raportojn pri la Bibliaj Tagoj, kiuj montras ke nuntempe ni trankvile povas renkontiĝi kaj malferme montri nian kredon kaj ĝui kunestadon kun kristanaj gefratoj.

Mi esperas al vi ĝueblan legadon.

# "BLACK HOLE"

Julia SIGMOND, RO/IT

Iam printempe, ĉirkaŭ paskofeste, mi havas "sankta vendreda"-jn pensojn.

Antaŭ longe, por mi, paskofesto signifis NUR la sanktan vendredon. Imagi la turmentojn de homo krucumita jam estis por mi anima sufero. Kaj ĉi sento ĉiujare ripetiĝis, ĝis kiam, post interparolado kun bona amikino, mi ne divenis mian eraron.

Multfoje mi pensadis pri la neceso de la sufero. Ĉu vere ne eblas vivi sen ĝi? Bone, bone, mi scias, ke la doloro signalas, ke en la homa korpo ĉeestas malsano kaj oni devas fari ion! Sed la diferenco inter doloro kaj sufero similas al la rilato inter ĝojo kaj feliĉo. Kiam multaj etaj ĝojoj kolektiĝas, jam ĝi estas feliĉo. Kiel la akvo de multaj riveroj iĝas maro, tiel la multaj doloroj transformiĝas al granda sufero, ĝi iĝas ĉagren-maro.

Kiam mortas amata homfrato, mi suferas, kaj tiel sentas, kvazaŭ sur la tero kreiĝus *nigra truo* [Black hole]. Oni devas akcepti lian morton, tamen, lia fizika malapero estas nekomprenebla.

Kaj la multaj *nigraj truoj* ariĝas, estiĝante tiel nekompreneblaj kaj enigmaj, kiel la "BLACK HOLE"-oj – almenaŭ por mi. Nome, vane mi legas la klarigojn pri ĉi tiu stranga astro, kaj vane mi komprenas la vortojn, ĉar la esencon mem mi ne povas kompreni kaj percepti, kion oni skribas pri ĝi. Mi akceptas ĝian ekziston, sed mi ne komprenas ĝin.

Ĝuste kiel neperceptebla estas ankaŭ tio, ke tiuj multaj belaj kaj bonaj pensoj kaj sentoj, kiuj kolektiĝas dum la vivo en homa animo, malaperas, neniiĝas (?), kvazaŭ estus englutitaj de *nigra truo*, de kie nenio povas reveni.



Krucumado laŭ manuskripto de la 10a jc

# Kio estas inkunablo ?

Ed BORSBOOM, NL

En Mezepoko oni jam kreis librojn. Precipe monaĥoj kaligrafis ilin, ofte sur pergameno. La nomo de tiuj raraĵoj estas manuskripto. En la lasta parto de la 15-a jarcento okazis revolucia invento, oni konstruis aparaton, per kiu la homo povis maŝine fari librojn. La pres-arto estis naskita! La unuaj de tiaj produktoj ankoraŭ ne estis perfektaj. La literoj ekzemple ne ĉiuj staris rekte kaj orde sur la paĝoj, sed post 1500 la procedo fariĝis pli bona. Tiujn komencajn presaĵojn de antaŭ 1501 oni nomas ”inkunabloj”. En Esperanto tiu radiko unue vortare aperis en la PIV de 1970. Ĝin parole uzis en 1974 WARINGHIEN dum prelego en la UK de Hamburg.

Nun estas la demando ”de kie devenas ”inkunablo”? En 1980 Waringhien publikigis en sia esearo “*1887 kaj la sekvo* ... “ artikolon kun la titolo ”*La inkunabloj de Esperanto”.* Mi parte citas lin, por klarigi la etimologion de la neologismo.

...

En Amsterdam vivis ĉirkaŭ la fino de la 17-a jarcento unu libristo; lia nomo estis Cornelisz van BEUGHEM. Tiu klerulo emis kolekti la malnovajn librojn. Spertinte, ke kun ĉiu jaro multaj el ili malaperas pro malzorgemo, bezono de brulmaterialo, incendio aŭ inundo, li entreprenis starigi liston de ĉiuj, kiujn li posedis aŭ kies ekziston li konis certe. Tiun liston li publikigis en 1688, sub la titolo *Incunabula Typographiae* tio estas la komenciĝo de la presarto.

La libro havis grandan sukceson kaj iom post iom la unua vorto de la titolo estis uzata por montri malnovajn librojn, presitajn antaŭ 1501. Van Beughem elektis ”incunabula” el la latina lingvo, ĉar ĝi signifas vindotukojn aŭ la unuan stadion de infano. Metafore li indikis la unuan stadion de la fenomeno “presita libro”.

En la naciaj bibliotekoj de la eŭropaj landoj bibliofilo povas admiri inkunablojn en la respektiva ŝtata lingvo. Ekzemple en Nederlando gastoj estas bonvenaj en Reĝa Biblioteko en Hago, kie konserviĝas 2144 inkunabloj.



Biblio de la jaro 1497

# La martiroj ten Boom el Nederlando

Vilĉjo Goldsmith, Usono

Niaj modernaj tempoj estas provizantaj multajn martirojn. Iuj el la plej famaj estas la familio *ten Boom* el Nederlando. Je la jaro 1837, Willem ten Boom malfermis butikon en Barteljorisstraat 19, Haarlem, kie li vendis kaj riparis horloĝojn. La butiko estis en la unua etaĝo de tre mallarĝa konstruaĵo; Willem kaj lia familio loĝis en la du supraj etaĝoj. Poste, Kasper, la filo de Willem, loĝis en la sama konstruaĵo kaj daŭrigis la negocon de sia patro. Nuntempe, tiu konstruaĵo estas muzeo je la honoro de la familio ten Boom.

La anoj de la ten Boom familio estis tre dediĉataj kristanoj. Ilia hejmo ĉiam estis malfermita al senhavaj personoj. Ili estis tre agemaj pri societa laboro.



La falsa muro kun la malantaŭa kaŝejo

Du fratinoj el la familio, Corrie kaj Betsie, estis fraŭlinoj dum la tuta vivo. Ili loĝis kun sia patro, Kasper, kaj helpis lin en la butiko.

Je la komenco de la Dua Mondmilito, la germana armeo invadis kaj ekokupis Nederlandon. Kun la subteno de sia patro, Corrie kaj Betsie kuniĝis kun la rezista movado. Anoj de la movado konstruis falsan muron en la dormĉambro de Corrie. Malantaŭe de la muro estas tre malgranda kaŝejo, kie kaŝiĝis kutime 4 judoj kaj 2 aŭ 3 anoj el la rezista movado. La rifuĝintoj restis kun la ten Boom familio kelkajn horojn aŭ tagoj ĝis alia sekura domo estus trovita por ili.

Corrie fariĝis gvidanto en la rezista movado de Haarlem. Corrie kun siaj helpantoj serĉis kuraĝajn familiojn kiuj akceptus la rifuĝintojn. Kiam la persekutitaj personoj estis  kaŝitaj, Corrie pasigis multan tempon prizorgante ilin: akirinte nutraĵ-biletojn, k.t.p. Por protekti kaj zorgi la persekutitajn personojn, la familio ten Boom riskis sian vivon. Ilia senperforta rezisto kontraŭ la nazioj estis ilia maniero por esprimi sian kristanan fidon.

La 28-an de februaro de 1944, la familio ten Boom estis perfidita, kaj la Gestapo atakis ilian hejmon. La Gestapo atendis en la domo dum la tuta tago kaj kaptis 30 personojn – ĉiujn kiuj alvenis al la domo. Kasper, Corrie, kaj Betsie

estis arestitaj. Kvankam la Gestapo zorge traserĉis la domon, ili ne trovis la judojn kiujn ili suspektis esti kaŝitaj tie. Fakte, du judaj viroj, du judaj virinoj, kaj du anoj de la rezista movado estis en la kaŝejo tie en la dormĉambro de Corrie. La ses personoj restis trankvilaj sen akvo kaj kun malmulte da nutraĵo en tiu malhela loko dum 47 longaj horoj. Spite ke la Gestapo gardis la domon, la rezista movado finfine sukcesis liberigi la rifuĝintojn. La kvar judoj estis forportitaj al aliaj "sekuraj" domoj. Tri el tiuj judoj travivis la militon. Unu el la du anoj de la rezista movado estis mortigita dum la milito, sed la alia supervivis.

> "Kaj Dio donos al vi sufiĉan gracon kiam vi estos suferanta."

Ĉar materialoj de la rezista movado kaj ekstraj (tro multaj) nutraĵo-porciaj kartoj estis trovitaj en ilia hejmo, la ten Boom familio estis malliberigita. La nazioj demandis Kasper (84 aĝulo) ĉu li komprenas ke li povos morti pro la helpo al judoj. Li respondis: "Ĝi estus honoro por mi doni mian vivon por la antikva popolo de Dio." Tamen, nazia oficiro kompatis al Kasper kaj ofertis liberigi lin se li promesus "konduti bone." Kasper respondis: "Se homo aperos antaŭ mia pordo morgaŭ petante helpon, mi nepre helpos lin!" Per tiuj vortoj, Kasper sigelis sian mortan mandaton. Li mortis 10 tagojn poste en la Scheveningena malliberejo.

Corrie kaj Betsie pasigis 10 monatojn en tri diversaj malliberejoj. La lasta estis la fifama Ravensbruck Koncentrejo proksime al Berlin. La kondiĉoj tie estis preskaŭ neelteneblaj. La gardistoj (iam ili estis gardistinoj – la plej malbonegaj) laŭ ilia kaprico punadis, torturadis, kaj mortigis la gemalliberulojn. Spite ke Corrie kaj Betsie tre endanĝeriĝis, suferis penigan laboron kaj fizikan insultadon, kaj ricevis malmultan nutraĵon, la du fratinoj daŭre disvastigis la amon de Jesuo inter la aliaj malliberulinoj. Multaj el ili fariĝis kristanoj pro la atesto kaj la ekzemplo de la du fratinoj.

Betsie mortis en Ravensbruck je la aĝo de 59. Christiaan (24 jara), nevo de la fratinoj, estis forportita al la koncentrejo Bergen Belsen pro lia aktiveco en la rezista movado kaj mortis tie. Willem (aĝo de 60 jaroj), frato de Corrie kaj Betsie, estis gvidanto de la rezista movado. Dum li estis en la malliberejo pro tiu "krimo", li malsaniĝis de spina tuberkulozo. Li mortis de tiu malsano je malmulta tempo post la milito.

Iomete antaŭ la nazia invado, Corrie rigardis la venontan danĝeron kaj esprimis al sia patro la timon ke ŝi ne povus elteni persekuton. Ŝia patro respondis; "Ĉu vi memoras kiam vi estis knabineto kaj ni veturis per trajno? Kiam mi donis la bileton al vi?" Corrie diris: "Vi donis la bileton ĵus kiam ni entrajniĝis." La patro respondis: "Kaj Dio donos al vi sufiĉan gracon kiam vi estos suferanta." Corrie spertis la veron

de tiuj vortoj .

Per "eraro" de la naziaj aŭtoritatoj, Corrie (de 53 jaroj) estis liberigita unu semajnon antaŭ ol ĉiuj la malliberulinoj de ŝia aĝo en Ravensbruck estis forportitaj al la gaskameroj. Ŝi komprenis ke ŝia vivo estis donaco de Dio, kaj ke ŝi devas disvastigi tion kion ŝi kaj Betsie lernis en Ravensbruck: "Ne ekzistas truo pli profunda ol la amo de Dio. Dio donos al ni la amon per kiu ni povos pardoni al niaj malamikoj."

Je la aĝo de 53 jaroj, Corrie komencis pastrecon kiu daŭris 33 jarojn. Dum tiu tempo, ŝi predikis en pli ol 60 landoj. Corrie atestadis pri la amo de Dio kaj ŝi kuraĝigis ĉiujn, kiujn ŝi renkontis kun la mesaĝo: "Jesuo Kristo estas la Venkanto!"

Oni kalkulas ke Corrie kaj la aliaj anoj de ŝia familio kune kun iliaj multaj geamikoj savis la vivon de pli ol 800 judoj kaj ankaŭ la vivon de multaj anoj de la rezista movado. La reĝino de Nederlando kavalirigis Corrie-n. En la jaro 1968, la Muzeo de la Brulkatastrofo (Yad Vashem) en Jerusalemo invitis Corrie por ke ŝi plantu arbon en la Ĝardeno de Justeco por honorigi la multajn judajn vivojn kiujn ŝia familio savis. La arbo de Corrie estas tie ankoraŭ.



La domo nuntempe estas muzeo.

> "Se homo aperos antaŭ mia pordo morgaŭ petante helpon, mi nepre helpos lin!"

Je la unua parto de la 70-aj jaroj, la sensacia libro de Corrie, LA KAŜEJO, estis eldonita. Poste, filma kompanio faris filmon de LA KAŜEJO, kun la sama titolo; ankaŭ la filmo fariĝis tre fama. Corrie verkis aliajn inspirajn librojn; ŝi ĉiam laŭdis la fidelecon de Dio meze de la malfacilaĵoj kaj la tragedioj de la vivo. Corrie mortis la 15-an de aprilo 1983, samtage de ŝia 91-a naskiĝtago. Ŝajnas ke Dio honorigis ĉi tiun grandan amikinon de Lia popolo per plenumi judan tradicion: nur la personoj tre, tre benataj ricevas la specialan privilegion morti je la naskiĝtago. Per sia fido, Corrie, kiel Habel, "*mortinte, ankoraŭ parolas.*" (Hebreoj 11,4)

# Pri persekutado religia

## Enkonduka ĉapitro el ANTOLOGIO LATINA 5, parto kvar

Gerrit BERVELING, NL

Daŭrigo de la antaŭa Dia Regno, numero 1/2013

**a] pri (ortodokse) kristanaj martiroj**

La Romia socio kutime ne tiom okupiĝis pri ĉies *persona* konvinkiĝo: ĉu fidi je Dio aŭ Dioj, kio gravas? Gravis nur la *socia* dimensio: se iu estis elektita en lokan urbestraron (eĉ en vilaĝo), ĉe la enoficiĝo oni estis devigita fari oferojn al la Dioj, por peti ties benon por la oficperiodo. Se iu havis konsciencriproĉojn, kiel okazis ĉe kristanoj en tiu situacio, li ne povis esti bona civitano. Do kristanoj pli malpli aŭtomate ekagadis kvazaŭ eksteruloj de la socia vivo. – Same kompreneble jam de generacioj estis la situacio koncerne Judojn: pro la *Toraaj* reguloj, la plimulto de la religiaj judoj ne vidis eblecon manĝi komune kun siaj najbaroj, eĉ ne ĉe simplaj kvartalaj festoj, kiam oni manĝis ekstere sur benkoj.

Do rezultis certa *fremdeco*. Kaj el fremdeco relative facile estiĝas malamikeco, klaĉoj en la najbaraĵo, k.s. – multaj "religiaj persekutadoj" ofte estas, ĉe pli deapuda pristudado, kvartalaj kvereloj inter najbaroj. La lokaj aŭtoritatuloj sentis sin devigitaj por fari kvieton, interveni kaj puni la kulpulojn – kio ofte estas la malplimulto, kiel pli facile kaptebla. Eble al tio atribuendas pluraj persekutoj, kiujn aludas tekstoj en Nova Testamento: Judoj kaj "novjudoj" (= kristanoj) interkverelis kaj per tio perturbis la kvieton socian…

Kelkfoje, tamen, okazis certa persekutado instigita de la registaro: ekzemple, unuafoje kiom ni scias en la historio de Romo, tio okazis dum Nerono (54–68). Kiam okaze de la fifama brulo de Romo, kiu kreis spacon por ampleksaj imperiestraj ĝardenoj kaj poste eĉ la Koloseo, la popolo en la brulantaj kvartaloj malriĉulaj ekprotestis, kulpigante pri la brulo la imperiestron (oni eĉ asertis ke laŭ lia ordono soldatoj forpuŝis sitelojn kun akvo el la brakoj de la homoj, kiuj kontraŭbatalis la fajregon), jam baldaŭ la protesto tiom akriĝis, ke Nerono sin sentis minacata. Li kulpigis tiam la *kristanojn*. Supozeble pri kristanismo li sciis nenion aŭ preskaŭ nenion.

Kiel ajn – ĉiu, kiu havis problemon kun iu ajn najbaro povis senprobleme kulpigi tiun pri kristanismo: la policistoj arestis, pridemandis (ne senperforte) por eligi konfesojn, kaj multajn oni kondamnis. Nerono fariĝis fifama kiel la unua persekutanto de Kristanismo[1].

Kio rezultis el tiu incidento? – Leĝo imperiestra de Nerono, ke "ne rajtas esti kristanoj"[2].

Poste estis relative kviete en la vasta Imperio ĝis Domiciano (81–96), kiu postulis esti adorata kiel "Sinjoro kaj Dio". Dum lia regado verkis la profeto Johano sian *Apokalipso:* konata el nia *Nova Testamento*.

En 250 p.Kr. imperiestro Decio

entreprenis provon fine komplete ekstermi Kristanismon, devigante oficistojn-policistojn iri laŭ la pordoj de la homoj por peti, ke oni plenumu oferado-ceremonion al la tradiciaj Romiaj Dioj. Kiu tion faris, ricevis ateston; kiu ne, riskis la morton. Dum ĉi persekutado mortis pluraj kristanoj, sed minimume same multaj – eble pli – apostatiĝis, kio post la morto de Decio liveris grandan problemon al teologoj. Vidu ĉe Cipriano.

Konserviĝis pluraj tiaj atestaĵoj pri oferinteco al la tradiciaj Dioj. Ekzemple en papirusaj fragmentoj el Egiptujo.

En 303 Diokleciano komencis lastan ĝeneralan ekstermo-provon pri Kristanismo. Por postaj generacioj ofte li estas kvazaŭ ekzemplo: Ĥrotsvitha de Gandersheim (ĉ 935–ĉ 1002), monaĥino germana, verkis plurajn teatraĵojn, i.a. *Dulcicio* pri la persekutado tempe de Diokleciano (vidu en *Antologio Latina* 8).

La venko de Konstantino kaj lia edikto pri tolerado el 313 finis la periodon de persekutado. Sed post tiam Kristanismo foje fariĝis de persekutata en persekutantan potencon.

Restas al ni sufiĉe multe da t.n. *Martir-atestaĵoj aŭ Martiraktoj*. Post martiriga proceso la surlokaj kristanoj kolektis la protokolojn, foje iom ornamis aŭ prikomentis tiujn per propraj reagoj k.s., kaj uzadis ilin, ekzemple okaze de diservoj por ĉiujara memorado pri la morto de la koncerna martiro. Ĉar pri martire mortintaj kred-atestantoj[3] oni nepre kredis, ke ili *rekte* iris al Dio en la ĉielo, laŭ la diro de Jesuo al la t.n. "kredanta murdisto", kiu kun li estis krucumita: *Laŭ Luko* 23:43. En *Antologio Latina* 4[4] oni jam povis legi la plej malnovan: la *Martirakto de Skilio*, kaj la plej faman: *Pasiono pri Perpetua kaj Feliĉita*. Ĉi-volume sekvos pliaj por ankaŭ iom montri diversajn tipojn.

### b] pri Donatistaj martiroj

La Donatistoj estas kristana movado, kiu estiĝis ĉirkaŭ episkopo Donato de Kartago (313–355), kiu estis elektita episkopo de parto de la loka eklezio anstataŭ alia episkopo, kiu laŭ ili ne estis sufiĉe severa. Efektive do temis pri loka skismo. La jaro 313 (la jaro de la edikto pri tolerado de Konstantino: fino pri persekutadoj kontraŭ kristanismo) por la eklezia historio gravegas. Sed tiu edikto ne finis ĉiujn problemojn: la diskutoj, kion fari pri kristanoj, kiuj cedis antaŭ persekutado kaj portempe malkonfesis sian religion, kiuj jam ege akre dividis la spiritojn tempe de Cipriano – vidu tie –, ankaŭ plu disŝiris la komunumojn kristanajn: la sekvantoj de Donato postulis, ke "vera" eklezio estu "perfekta", do senmakula. Do homoj, kiuj iam malkonfesis, ne plu povis esti membroj, ktp.

La Donatisma skismo – kiun nuntempe oni probable titolus *fundamentisma* – vaste disŝiris la Afrikan eklezion: ili formis propran paralelan eklezion; en 336 Nord-Afriko havis jam 270 Donatismajn episkopojn. En koncilio de *Arles* (Suda-Francio) ili estis kondamnitaj, sed ili plu ekzistis. Imperiestro Konstantino en 321 eĉ oficiale agnoskis ilin kiel duan eklezion en Afriko, kun egalaj rajtoj. Multaj lokoj havis du episkopojn.

Kelkfoje la Donatistoj formis

perfortemajn grupojn por ataki "normalajn" (katolikajn) kristanojn, kredante, ke se ili mortos tiumomente, aŭtomate ili fariĝos martiroj – sekve venos en la ĉielon. Kiu aliĝis al ili, estis re-baptita, ĉar la normalan bapton (de "tiu ne sufiĉe radikala kristanismo") ili ne rekonis.

Donatismo daŭris plu kiel propra paralela kristanismo. Ankaŭ tempe de Aŭgustino (fine de la 4-a jc) la situacio restis tragedia. En 411 li organizis religian diskuton kun ili en Kartago: 286 Katolikaj episkopoj kontraŭ 279 Donatismaj[5]. Denove Donatismo estis kondamnita, sed ĝi restis plu ekzisti ĝis ĉe la alveno de Islamo[6] ĝi malaperis.

### c] pri Arianaj martiroj

Arianismo estiĝis pro instruo de Ario (256–336), presbitero en Aleksandrio. Li emfazis la unuecon de Dio. Malsame ol la plimulto de Kristanismo, Arianismo konsideras Jesuon kaj sanktan Spiriton kiel submetitajn al Dio la Patro. Fariĝis eklezi-vasta konflikto inter Unitariismo kaj Trinitariismo[7]: kredo je Dio kiel Triunuo. En 325 la – oficiale nur pagana! – imperiestro Konstantino kunvokis la unuan ekumenan koncilion en Niceo; la akceptita kredkonfeso de Niceo parolas pri Dio la Patro kaj la Filo kiel "samsubstancaj". Tamen, Arianismo plu ekzistis, ĉar la filozofiajn terminojn ili malsame interpretis ol la ortodoksaj kristanoj.

En 251, dum imperiestroj Decio kaj Herenio Etrusko, la tiama papo de Romo sendis sep episkopojn al Gaŭlio por tie venki Arianismon. Multaj Gaŭloj ja apartenis al Arianismo. Ankaŭ pluraj germanaj popoloj rande la Romia Imperio aliĝis al ĝi.

Fama estas ankoraŭ la okcident-gota episkopo Vulfilo (*Wulfila*, ĉ 310–ĉ 382), kiu faris Gotan tradukon de la biblio. Vulfilo disvastigis la Arianan version de kristanismo inter la Gotoj.

Kelkaj imperiestroj malkaŝe subtenis Arianismon, dum aliaj persekutis ĝin. Ĉirkaŭ 400 p.Kr. en la Romia Imperio pere de akra persekutado ĝi estis pli malpli neniigita.

### d] pri Judaj martiroj

Ĝenerale koncerne Judojn estis relative kviete en la vasta Imperio. Krom, kompreneble en Palestino mem. Judismo estis ne devigita kunkulti la Imperiestron en ties Dia rolo; la Romia ŝtato "realisme" akceptis ilian "fremdecon" en tio, ke Judoj ja simple ne havas pli ol nur unu Dion – kaj sekve dua Dio ne estas nur eta paŝo kiel ĉe ĉiu "normala" religio… Sekve oni lasis ilin kvietaj en tio. Kondiĉe, ke ĉiujare la Ĉefpastro preĝu en la templo en Jerusalem por la sano de la imperiestro – kaj pagu iom da ekstra tributo…

Ankaŭ tre grava ĉi-teme estis la pogromo en Aleksandrio sub Klaŭdio; la tuto komenciĝis el intenco de Kaligulo en 39 p.Kr. starigi statuon pri si mem en ĉiuj temploj, ankaŭ en tiu de Jerusalem[8]. En 49 ĉiuj Judoj estis ekzilitaj el Romo, ĉar ofte okazis kvereloj kaj stratbataloj inter (eks-Judaj) Kristanoj kaj (pli ortodoksaj) Judoj. Klaŭdio forpelis ĉiujn, por gardi kvieton.

En 66 iu Floro (*Florus*) ŝtelis aferojn el la templo en Jerusalem; rezultis

insurekcio kontraŭ la Romia potenco, kun kulmine la neniigo de la Juda templo en Jerusalem (70 p.Kr.). Ĉirkaŭ tiu tempo estis neniigitaj i.a. la setlaĵoj en la nuna *Qumran*[9] kie en 1947–1956 oni retrovis en 11 grotoj amason da Hebreaj tekstoj kaj – fragmentoj, i.a. pli malpli kompletan rulaĵon kun la teksto de *Jesaja*.

Mortis tiumilite amaso da homoj; multoj fuĝis.

En 116 Hadriano ordonis mortigi ĉiujn Judojn en Mezopotamio; sekvis la "Dua Juda Insurekcio"; en 117 li i.a. malpermesis la cirkumcidon al Judaj knaboj (kun pravigo, ke li deziris protekti infanojn kontraŭ korpa mutilado); sekvis pli da kontraŭ-Judaj verdiktoj: malpermeso studi la Toraon, malpermeso celebri la ŝabaton. En Lido (nuna Lod) multaj Judoj pereis.

La "Tria Insurekcio" estis 132–135, sub gvidado de Simono Bar Koĥba, kiun oni honoris per la titolo *Mesio*. La Romiaj armeoj reagas ege fanatike. Fine mortis inter 600.000 kaj eble miliono da Judoj. Jerusalem estis neniigita kaj samloke oni konstruis Greke-Romian novan urbon kun la nomo Elio-Kapitolino (*Aelia Capitolina*), kun ĉeftemplo dediĉita al Jovo.

Rezultas la *diasporo*.

Persekutado de Judoj fare de kristanoj eble komenciĝis en la 4-a jc. Mi ne trovis tekstojn el frua tempo, kiuj tion atestas.

## e] pri Maniĥeaj martiroj

Maniĥeoj en pluraj medioj estis persekutataj. Jam tuj dekomence la profeto Mani mem, kiu mortis martire: origine Mani senprobleme povis predikadi, kun aprobo de la Persa reĝo Ŝapuro la 1-a (241–272), kiu estis tre tolerema en religiaj aferoj. En la Romia Imperio tamen li estis proverbe fi-fama kiel la plej grava neniiganto-malamiko, iom simile kiel siatempe Hanibalo. Imperiestro Valeriano la 1-a (253–260) estis venkita de li kaj ĝismorte torturita; lia haŭto – preparita – pendis kiel trofeo en la palaco de Ŝapuro. Sed la kasto de la magoj (pastroj de Mitrao) post lia morto, sub reĝo Baramo la 1-a (*Bahram*), radikale ŝanĝis la etoson: Mani estis kaptita, torturita kaj ĉ 276 mortis kiel martiro. La Zoroastra religio rekonkeris sian regadon super Budhismo, Judismo, Kristanismo ktp… Depost tiam la Persa regno persekutadis la Maniĥeojn.

Ankaŭ en la Romia Imperio ili ofte estis persekutataj. Por doni ekzemplon koncerne Nord-Afrikon, jen cito el koncerna edikto de Diokleciano de 297[10]:

> "La imperatoroj Diokleciano kaj Maksimiano Aŭgustoj kaj Konstantino kaj Maksimino plej noblaj Cezaroj, al Juliano prokonsulo de Afriko: (..) 4: (..) Ni aŭdis, ke antaŭnelonge kiel nova kaj neantaŭvidita plago en tiun mondoparton envenis la Maniĥeoj, devene aŭ naskite el la Persa lando, kiu malamikas al ni, kaj ke ili faras multe da malbono (..) kaj ke estas timende ke, kiel ofte okazas en tiaj aferoj, kun la paso de l' tempo, per siaj malindaj moroj kaj la fiaj leĝoj de la Persoj ili infektos ne nur la modestan kaj kvietan Romian

popolon, ĉi tiujn plej senkulpajn homojn, sed eĉ tiun ĉi nian universan mondon, kvazaŭ per mortiga serpento-veneno. [...] 6 Ni do ordonas, ke la aŭtoroj kaj gvidantoj kune kun siaj abomenaj skriboj submetiĝu al plej severa puno, tiel ke ili estu bruligitaj en flama fajro; la sekvantojn kaj la konsentantojn oni mortkondamnu, kaj iliajn havaĵojn oni konfisku por nia trezoro. 7 Se eventuale honoruloj aŭ personoj de certa indeco transiris al tiu ĉi misfama sekto aŭ al ĉi doktrino de Persoj, iliajn havaĵojn vi konfisku por nia trezoro, kaj ilin mem vi sendu en la minejojn de Feneso aŭ Prokoneso. 8 Por ke ĝisradike neniiĝu ĉi tiu infekto el nia plej feliĉa epoko, via pia sindediĉo haste obeu al la ordonoj kaj reguloj de nia bonvolemo. Donite la 31-an de marto en Aleksandrio."

Do fariĝis leĝo, ke iliajn spiritajn gvidantojn (episkopojn) kaj iliajn sanktajn skribojn oni bruligu, la pli simplajn sekvantojn oni "nur" senkapigu – kaj ĉies havaĵojn por la ŝtato oni konfisku.

Precipe en la 4-a jc tiu konfiskada regulo ofte kondukis al gravaj per-sekutoj, en kiuj volonte partoprenis ĉiuspecaj, eĉ inter si batalantaj kristanaj grupoj: la katolikaj same kiel la Donatistoj.

Ankaŭ Aŭgustino, kiu mem en fruaj jaroj apartenis al la Maniĥeoj, plene aprobis tiun sintenon de la registaro; li eĉ konsideris ĝia tasko, ke ĝi senigu la landon de herezuloj.

Kiel multe da martiroj Maniĥeaj efektive falis, ne estas sciate. Sed ĉu multnombre aŭ ne: tiu ĉi persekutado estis relative efika. Maniĥeismo grand-parte malaperis el la Romia Imperio.

ꕥ

---

1 La priskriboj en *Quo Vadis* de Sienkiewicz pri tutaj preskaŭ senfinaj vicoj da senkulpaj kristanoj murditaj historie estas ne realecaj. Eble tie parte parolis la Pola patrioto. Pli serioze traktas la temon Anna Löwenstein en sia *Morto de Artisto*.

2 Vidu en *Antologio Latina* 4, ĉe Plinio-Trajano.

3 Efektive *martiro* signifas *atestanto*, nome pri la fido.

4 Fakte jam pli frue, apendice en *Apologio* de Tertuliano: Vlaardingen, VoKo 1982.

5 Unu de la temoj estis, ĉu sakramento (bapto, ekzemple) estas valida, se faras ĝin iu pastro ne vere inda. Laŭ Donatistoj ne – laŭ Katolikoj jes, ĉar ne la pastro estas garantio pri sakramento, sed nur Dio mem. Homoj ja povas esti neperfektaj.

6 Historie la konkero de Nord-Afriko fare de Islamo estis grande faciligita de tio, ke multe da tieaj kristanoj vere laciĝis pri ĉiaj internkristanaj pridogmaj kvereloj. Islamo prezentis simpligitan teologian instruon facile akcepteblan por multaj

7 Dum la *Reformacio* la temo, kompreneble, ree fariĝis aktuala: Michaelo Servet en Ĝenevo eĉ martire mortis pro ĝi sur brulŝtiparo – kun plena konsento de Kalvino mem.

8 Filono Aleksandria (ĉ 12 a.Kr. – ĉ 54 p.Kr.) – *Legatio ad Caium*: okazis pogromo kontraŭ Aleksandriaj Judoj; Filono estis membro de delegacio al Romo por protesti ĉe imperiestro Klaŭdio, kiu sekvis Kaligulon kiel imperiestro.

9 Fakuloj kutime supozas, ke inter ĉ 140 a.Kr. kaj 68 p.Kr. la setlaĵon okupis branĉo de la t.n. Esenoj, aŭ Kumran-sekto aŭ Mortmara Sekto. Laŭ pluraj estis ia monaĥejo. Aliaj tion neas.

10 Cod. Gregor. L.xiv. de maleficis et manichaeis; titulus iv.

# Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, VIII a

**Medicino, mistiko, muziko – László Batthyány-Strattmann**

DUDICH, Endre, HU

## 1. László Batthyány-Strattmann

(Dunakiliti 1870 – Vieno 1930)

"*Kuracas mi, sed sanigas Dio*"

La hungara aristokratia familio Batthyány devenas de la pra-hungara ĉefo Eörs, kaj dum jarcentoj donis multajn elstarajn personaĵojn al la patrujo.

László naskiĝis la 28-an de oktobro 1870 en vilaĝo Dunakiliti. Lia patro Jozefo estis estro de ĉefdepartemento de Moson. La gimnazion li komencis en la jezuita kolegio de Kalksburg, daŭrigis en Kalocsa (el kie li devis foriri pro miskonduto), kaj finis per privata abitura ekzameno en urbo Ungvár (Uzhorod).

Jam kiel infano, li volis iĝi kuracisto, por ĉesigi aŭ almenaŭ mildigi la suferojn de aliuloj, antaŭ ĉio de sia patrino. Sed lia patro firme kontraŭis tion, ĉar post la frua morto de la unuenaskita filo Jozefo, László devintus mastrumi la familian grandbienon. Finfine, mortanta pro kancero de stomako, li tamen konsentis (en 1897).

László pasis unu jaron en militservo, kaj finis tion kiel husarleŭtenanto. Poste li studis ekonomion, kemion kaj astronomion en Vieno (1893-1896). Post la forpaso de sia patro, László ekstudis medicinon en Vieno. En 1898 li edziĝis al grafino Maria Tereza Coreth.




Batthyány-Strattmann memoriga premio

László iĝis *Dr. med.univ.* (ĝenerala kuracisto) en la jaro 1900. Li ekzameniĝis pri kirurgio kaj akuŝologio, kaj en 1906 iĝis oftalmologo (fakkuracisto pri okulmalsanoj).

El sia patra heredaĵo László estigis hospitalon por la malriĉuloj, kun 20 litoj, en vilaĝo Köpcsény /Kittsee. En la jaro la hospitalo registris pli ol 6.000 ambulantajn pacientojn kaj preskaŭ 500 operaciojn faritajn. La famo de la "bonkora doktoro" baldaŭ trapasis la landlimon. Ne nur pro tio, ke li kuracis senpage, kaj lia terapio atingis elstarajn rezultojn, sed precipe pro la etoso radianta la dian amon al ĉiuj.

Kun Maria Tereza Coreth – kiu ellernis la malfacilan hungaran lingvon –

ili havis 13 (!) infanojn. La vivon de la familio karakterizis la Kriston imitanta /sekvanta, senkondiĉe sindona amo en strikte organizita kadro.

En la jaro 1915, post la morto de lia onklo, Ödön Batthyány, kiu ne havis idon, László heredis la latifundion (grandbienon) de Körmend, la duoblan famili-nomon kaj la titolon de princo. Li devis transloĝiĝi al la kastelo de Körmend, kaj tie li establis sian duan malsanulejon.

Tiam li estis jam konata kaj respektata specialisto-okulkuracisto. Li aperigis studojn pri kazoj en la fakrevuo *Zentralblatt für Augenheilkunde*. Oni ofertis al li universitatan katedron, sed li rifuzis, ĉar volis resti ĉe siaj pacientoj – malriĉuloj.

Dum la mondmilito li servis kiel distrikta kuracisto de tri vilaĝoj (Pama, Edelsthal, Kittsee). Li obstine luktis kontraŭ la tuberkulozo kaj la traĥomo. Kun siaj pacientoj, se necese, li parolis ankaŭ slovake aŭ kroate. (Krom la gepatraj hungara kaj germana lingvoj, kaj la klasika (kaj medicina) latina, László parolis ankaŭ angle, france kaj itale.)



Blazono ĉe la domo de Batthyány en Vieno

László havis tre lertajn manojn. Li uzis ilin krom la operacioj ankaŭ por ĉiuspecaj brikoladoj, riparo de horloĝoj, piano- kaj orgenludado, eĉ por ĵonglado. Krome li dancis, rajdis kaj ĉasadis bone, ŝoforis, eĉ organizis praktikajn kursojn por ŝoforoj. Li ŝatis pentri, sed sincere rekonis sian diletantecon. Li konis laŭnome multajn animalojn kaj plantojn. Kio koncernas la manĝadon, trinkadon kaj sinvestadon, László estis puritana. Lia sola pasio estis la fumado… Li sentis sin bone en familia rondo, sed kiel eble evitis la "altan societon". Pli ol modesta, li estis humila, precipe rilate al la eklezio. Malĝentilan aŭ obscenan paroladon li ne toleris. Tamen multajn distingojn li ne povis eviti. Li estis membro de tri kavaliraj ordenoj, dumviva ĉefdepartementestro, membro de la Alta Ĉambro de la Nacia Asembleo, ktp.

La religia, spirita vivo de d-ro László Batthyány-Strattman meritus detalan analizon, sed tio ne estas nia tasko. Tio estis farita dum la proceduro de lia beatigo. Tamen estu permesite elnombri ties ĉefajn trajtojn.

- Vivo en la ĉeesto de Dio, fari ĉion por la gloro de Dio.
- Senkondiĉa amo de la proksimulo (ĉiuj homfratoj).
- Senkondiĉa akcepto kaj konfeso de la doktrino de la Eklezio.
- Fido je la efiko de la preĝo.
- Memdisciplino sen troigoj.
- Kontemplado kaj meditado. – Kulto de la Eŭĥaristio.

– Kulto de la Sankta Virgulino Maria.
– Pilgrimado al la sanktejoj de la Virgulino.
– Kulto de Sankta Jozefo, la patrono de la familioj.
– Kulto de reĝo Sankta Ladislao, lia patrona sanktulo.
– Kulto de Sankta Paskalo.
– Sankta meso, Oficino kaj rosario ĉiutage.
– Ofta konfeso (se eble, al lia spirita gvidanto), kaj komunio, se eblas, ministrado.
– Vivi priatentante la liturgian kalendaron.
– Senĉesa bonfarado.
– Apostola zelo por savi animojn: li eĉ verkis libreton por siaj pacientoj kun la titolo: "*Malfermu la okulojn kaj vidu*!"
– Respekto de la pastroj kaj monaĥoj.
– Li estis membro de la terciara ordeno de la Franciskanoj.

Kiam en 1918 la Aŭstria-hungara Monarĥio kolapsis, László kun sia tuta familio moviĝis al Vieno, poste en Svislandon. Sed jam en 1919 ili returnis sin al Körmend. Li estis legitimista, fidela al la reĝo, eĉ kiam Karlo la 4-a devis forlasi la tronon.

La packontrakto de Trianon (4 junio 1920) tranĉis la bienon je tri partoj. La vilaĝo mem apartenos al Aŭstrio, la fervoja stacidomo al Ĉeĥoslovakio, kaj la agroj al Hungario.

En septembro 1928 fakkuracistoj en Vieno konstatis, ke d-ro Batthyány havas kanceron de la urina veziko. La 27-an de novembro ili operaciis lin, sed vane. Li devis suferi kruelajn dolorojn, ripetitajn kramfojn ktp dum 14 monatoj. La homoj jam kvazaŭ pilgrimadis al lia hospitala lito. Li heroe toleris la suferon, dirante:

> *"Mi volas antaŭ la tuta mondo danki al Dio pro la sufero, kaj peti lin ke li donu plu, ĉar tio estas bona kuracilo por mia animo kaj bona ilo por helpi aliulojn."*

Li forpasis la 22-an de januaro 1931, en la viena sanatorio *Löwe*. Post funebraj ceremonioj enVieno kaj Körmend, la kadavron de d-ro László Batthyány oni metis en la familian kripton troviĝantan sub la preĝejo de Németújvár.

Lian nomon portas jam hospitalo, medicina premio, kaj memormuzeo.

Fine de okjara proceduro, la 23-an de marto 2003 papo Johano Paŭlo la 2-a deklaris d-ron László Batthyűny-Strattmann "*beato*."

— o —

El Vikipedio:
*Beatigo* nomiĝas tiu proceso de Romkatolika Eklezio, kiam papo solene proklamas iaman kristanon beatulo, preskaŭsanktulo.

Dum la beatiga proceso la eklezio ekzamenas vivon, agojn kaj aljuĝitajn miraklojn de la kandidato. La proceso povas okazi ĝenerale 5 jarojn post morto de beatonto. La papo povas fari esceptojn kiel ĉe Johano Paŭlo la 2-a, kiam jam samjare komenciĝis la proceso.

# Estrarano – Václav Pospíšil

LA PROFILO

Karaj, kial skribi pri mi? Koni la eraon, en kiu ni devis vivi, estas grave. Jarojn post la dua monda milito ĝis hodiaŭ. Multaj idealoj, tamen ĉiuj misuzitaj nur en la servo de komunisma ideologio. Mi havas ankoraŭ multajn broŝurojn de tiu tempo. Paroladoj de sovetaj ŝtatestroj tradukitaj en Esperanton. Oni multe parolis pri la paco kaj preparis militon. Esperantaj rondetoj povis funkcii, ĉar Esperanto estis agnoskita porpaca lingvo. Tamen uzi ĝin en vere porpacaj kaj tuthomaj idealoj oni ne eblis. Eĉ la Ĉeĥa Esperanto Asocio ne rajtis ekzisti kaj la malpli granda sekcio de KELI tute ne. Estas vero, ke lerni Esperanton ne estis tiom suspektinda kiel lerni la anglan. Tamen en gimnazio oni instruis la germanan kaj la francan. Malpli imperialismaj lingvoj ol la angla. Mi diras en la gimnazio, tamen eĉ tiun klasikan nomon tiu ĉi mezlernejo ne povis havi. Laŭnome ĝi estis Meza ĝenerale kleriga lernejo.

Ke ekzistas Esperanto mi ekkonis pli frue. Kiel juna knabo mi trovis en la subtegmento de nia domo broŝureton pri Esperanto kaj Ido. Tio instigis mian scivolon. Post mallonga tempo mi komencis viziti la naŭan klason de Baza lernejo en distrikta urbo Kroměříž (Kromierĵiĵ). En mia proksima naskiĝvilaĝo Břest (Brĵest – malnovslava nomo de ulmo) tiu ĉi naŭa klaso ankoraŭ ne funkciis. En Kroměříž mi trovis Esperanto-rondeton, kie mi ellernis legi Esperante kaj traduki laŭ la vortaro. Sed poste, dum la studoj en la gimnazio (antaŭkomunisma kaj hodiaŭa nomo de mezlernejo, kiun mi vizitis) mi ne havis forton daŭrigi la studon de Esperanto. Iomete mi ellernis la rusan, germanan kaj nedevigan latinan lingvojn. Mi volis studi teologion. Ŝajnis, ke romkatolika eklezio ĉe ni restos sen pastroj. La teologia fakultato, historia parto de Univesitato de Prago (fondita 1348 de Karolo la IV.), estis elĵetita el Prago en la distriktan urbon Litoměřice, foran 70 kilometrojn. Ankaŭ nombro de seminariistoj estis celkonscie malpliiĝinta. Nur 7 novaj pastroj dum unu jaro por la duono de tiama Ĉeĥoslovakio. Tamen kvin jarojn antaŭ la Praga printempo komenciĝis iomete varmiĝi, kaj en nia klaso ni estis jam 20.



Dum la kvindekaj jaroj estis romkatolikaj ordenoj likviditaj. Tamen sekrete ili daŭrigis sian vivon. Mi kun kelkaj pluraj seminariistoj estiĝis sekretaj Dominikanoj. La ordeno ebligis al mi pliajn studojn en dominikana Universitato en Romo. La Praga printempo jam finiĝis per la invado de armeoj de Varsovia Pakto, do la malfacilaĵoj aperis. Mi eĉ devis post ne tutaj du jaroj reveni hejmen, alie mi estus konsiderata fuĝinto.

Mi revenis kiel pastro, parte vivis en dominikana komunumo de tri fratoj, parte deĵoris kiel paroĥestro en la najbara paroĥo. Tiam komenciĝis nova periodo en mia vivo. Estis en tio iom de mia naiveco kaj nematureco. Mi edziĝis, foriris el eklezia deĵoro kaj komencis labori en paneldomkonstrua firmao. Mi devis vivteni la familion. Tiam mi fine havis pli da tempo kaj komencis denove lerni Esperanton. Post nia velura revolucio (kiu ankoraŭ ne finpaŝis al bela fino) mi ekkonis Unuiĝon de Moraviaj Fratoj kaj ekŝatis ĝin. Iam mi aniĝis en la Dominikana ordeno pro la idealoj, kiujn mi estimas daŭre. Tamen la vivo de la Dominikana ordeno ne estis ĉiam tiom ideala. Kontraŭe en la familio de Moraviaj Gefratoj neniam estis malhela periodo. Nun mi estas krom mia civila deĵoro predikanto de malgranda komunumo.

Mi devas konstati, ke mi ankoraŭ ne faris multon por Esperanto kaj por la diskonigo de Jesua evangelio pere de Esperanto, sed mi senĉese esperas, ke paŝo post paŝo ...

# Kongresi ?

Prezidanto Philippe COUSSON, FR

Nia ligo havas du ĉefajn agadkampojn, du ĉefajn renkontiĝejojn, du ĉefajn rimedojn vivi. Ili estas tiu ĉi nia revuo kaj nia kongreso.

Ĉar vi legas tion, vi partoprenas en nia revuo. Mi esperas ke vi ĝuas la rezulton de la laboro de nia redaktoro.

Sed tamen, pluraj el vi mankas al ni en la kongresoj. Kaj same al vi mankas la etoso, la ĝuo partopreni ilin. Vi eble jam partoprenis niajn kongresojn iam, antaŭ jaroj, kaj scias kion tio povas signifi, frate vivi dum semajno kun homoj kiujn vi neniam havus la okazon renkonti en aliaj cirkonstancoj, dividi la spertojn, kaj kune preĝi.

Vi eble partoprenis en aliaj esperantistaj kongresoj, renkontiĝoj. Sed ĉu vi povas imagi kiel estas kiam al la esperantisteco aldoniĝas la kristana kunvivado? Ĉiusence plena semajno. Ĉu vi aŭdacus mistrafi tion?

Komprenble, povas okazi diversaj cirkonstancoj aŭ kondiĉoj kiuj malhelpas partopreni ĉiun jaron. Kial ne ĉiun duan jaron? Ĝuste 2013?

Ne estas tro malfrue aliĝi al Svitavy. Ne nur la loko allogas, sed ankaŭ la kristana frataro, la spirita etoso, la esperantista medio (kaj muzeo!).

Vi estas atendataj, esperataj. Venu kaj vidu!

# Bibliaj tagoj 2013 en Strasburgo

Raportas Martin Turban, DE

Strasburgo, kiu situas ĉe la landlimo inter Francio kaj Germanio, estas vere vizitinda kaj vidinda urbo. Ni spertis tion dum la ekumenaj Bibliaj Tagoj kiuj tie okazis en la Kultura Centro S-ta Tomaso de la 13a ĝis la 17a de marto 2013.

Mia edzino (protestantino, E-komencantino) kaj mi (katoliko, nova dumviva IKUE-membro) estis la unuan fojon partoprenantoj je Bibliaj Tagoj. Malgraŭ la neĝa vetero ni havis bonan veturadon aŭtomobile de nia hejmurbo Bamberg (Germanio) ĝis Strasburgo. Nia navigilo gvidis nin tra la okcidentaj regionoj de la urbo. Jam de malproksime ni povis vidi la altegan katedralan turon, kiu estis inter la jaroj 1647 kaj 1874 eĉ la plej alta konstruaĵo de la mondo. Nia vojo kondukis nin ankaŭ preter gravaj eŭropaj institucioj: la juĝejo por homaj rajtoj kaj la eŭropa parlamentejo (impona ampleksega vitra konstruaĵo). Alveninte ni ricevis grandan dulitan ĉambron kun bela vido al la vasta parko de la Kultura Centro. Ni sentis nin tre bone akceptitaj.

La unuajn E-istojn, kiujn ni renkontis en la Kultura Centro estis Stefan Lepping kaj Albrecht Kronenberger. Stefan Lepping, kiu estas pofesia preĝeja muzikisto, organizis la aranĝon. Albrecht Kronenberger estas katolika sacerdoto kaj estas konata interalie kiel unu el la verkistoj de la ekumena preĝo- kaj kantolibro "Adoru". Dum la vespero alvenis pli ol 20 partoprenantoj el 5 landoj: Belgio, Francio, Germanio, Italio kaj Slovakio. La aranĝo komenciĝis per komuna matenmanĝo en la manĝosalono. Dume ni aŭdis, ke nova papo estis elektita. Sekve la grupo decidis rigardi la "habemus papam" (E-lingve: "ni havas papon") en la franca televido. Tiamaniere la Bibliaj Tagoj komenciĝis per grava eklezia okazaĵo. En la mesoj de la sekvontaj tagoj ni jam povis preĝi por la nove elektita papo Francisko. La unua tago finiĝis per komuna kompletorio en la kapelo.

En la venontaj tagoj ni havis riĉan



Grupa foto. Fotis K-H Schaeffer

programon. Ĉiu tago komenciĝis per rozario (kun bibliaj meditetoj) aŭ meso. Je tri tagoj okazis prelegoj de Patro Willibald Kunigk el la monaĥejo Nitschau (Germanio) pri bibliaj temoj: "Dio fariĝis homo", "Dio nin elaĉetis" kaj "Dio vivas kun ni". Post la prelegoj la grupo havis eblecon, diskuti pri la dirit-aĵo. Estis intensa interŝanĝo de pensoj. Eĉ mia edzino kiel E-komencantino povis kapti la plej gravajn enhavojn. Vespere ni kune rigardis filmon (kun E-subtitoloj) aŭ ludis. Ĉiam denove okazis kantado el "Adoru" kiu akompanis nin la tutan tempon.

Je du posttagmezoj estis tempo por esplori la malnovan urbocentron, kiu estas ĉirkaŭita per akvo. Krom la katedralo impresis nin la malvastaj stratetoj kaj la trabfakaj domoj en la alzaca stilo. Rimarkinde estas ke multaj stratnomoj estas dulingvaj: en la franca kaj en la strasburga alzaca dialekto.

Vendrede antaŭtagmeze ni vizitis instituton por ekumena esplorado. Tie ni povis paroli kun ties estro. En tiu instituto estis formulita la komuna deklaro pri la pravigo-instruo (de protestanta flanko). La instituto estas ĉiam denove renkontejo por teologoj de la diversaj konfesioj. Vespere venis al nia grupo la juna evangelia pastoro Wolfram Rohloff el Zöblitz (Germanio). Sabate li celebris kun ni protestantan diservon kun sankta manĝo. En sia prelego li rakontis al ni pri la nova papo Teodoro la 2a de la kopta eklezio en Egiptio kaj pri lia interesa kariero.

Dimanĉo estis nia lasta komuna tago. Ni festis sanktan meson kaj ekumenan ferman diservon. Sekvis lastaj kantoj kaj la tagmanĝo. Tiam ĉiuj diris "adiaŭ" unu al la alia kaj ni devis veturi hejmen. Ni estis plenumitaj per multaj bonaj impresoj precipe per la sono de psalmoj kaj himnoj je la gloro de Dio. Mia edzino poste diris al mi entuziasme, ke ŝi neniam antaŭe kantis tiom multe en tiom malmultaj tagoj. – Al mi Esperanto denove montriĝis kiel taŭga komprenilo inter homoj de diversaj landoj kaj diversaj konfesiaj tradicioj. En tiu lingvo ni povis kune paroli, kanti kaj preĝi. En mia opinio Esperanto havas la potencon fariĝi la "nova latino de la eklezio" (laŭ titolo de konata libro de Ulrich Matthias). Mia edzino kaj mi jam ĝojas pri venontaj tiaj renkontiĝoj kiel estis ĉi tiuj Bilbliaj Tagoj.

ꞓ

---

# Bibliaj tagoj 2013

Raportas Siegfried KRÜGER , DE

Stefan Lepping skribis pri la historio de la Bibliaj Tagoj jene: La ideo de la Bibliaj Tagoj kun Adoru naskiĝis post la apero de la ekumena preĝ- kaj kantlibro Adoru. Pli frue ilin organizis Pastro Bernhard Eichkorn el Villingen/ suda Germanio, kiu bedaŭrinde ĉi-foje ne povas ĉeesti.

La celo estas, meti la du gravajn Esperantajn kristanajn librojn, la Biblion

kaj Adoru-n, kiujn multaj Esperantistoj fiere havas sur sia libro-breto, en la praktikon, por ĉerpi el ilia riĉeco. La Bibliaj Tagoj havas plurajn akcentojn: legadon kaj studadon de la Biblio, i.a. per prelegoj; komuna preĝado kaj kantado el Adoru (kio fakte ankaŭ ofte estas vivigo de Bibliaj tekstoj, ekz. la psalmoj, legaĵoj ktp); la amika kaj ekumena kunestado; la konatiĝo kun ekumenaj demandoj kaj temoj (ankaŭ pere de la gastigantaj urboj, kaj ties rilatoj al kristanismo de diversaj konfesioj en historio kaj nuntempo). Estas tre interese, fari ĉion ĉi sur internacia nivelo per la bela kaj spiritoriĉa lingvo Esperanto! Estas interese ekscii kaj sperti, kiagrade oni kapablas sur tiu nivelo – ne ligite al la limoj de naci(lingv)a vidpunkto – rekte kapti verojn (aŭskultante kaj diskutante) kaj la Spiriton de Dio (kantante kaj preĝante). Tiel Esperanto fariĝas ne nur afero de la intelekto, sed ankaŭ de la koro; ne nur homa inventaĵo, sed perilo de Dio mem. Zamenhof, kiel judo, ankaŭ estis religia homo, kiu lasis sin inspiri, kreante Esperanton, kaj unu el liaj tradukadoj estis – la Biblio! Ni do spertas Esperanton kiel donaco de Dio: ne nur al la mondo, sed ankaŭ al Lia popolo, la Eklezio. Esperanto havas specialan spiritualecon de malfermeco kaj toleremo, kun humanaj principoj, kiu bone inter-agas kun bone komprenita kristanismo. Tio estis la priskribo de Stefan Lepping.

Mi pensas kaj spertis, ke krom tiaj eble teoriaj celoj de Bibliaj Tagoj, ankaŭ la amuziĝo kaj ĝuado kaj flegado de vera internacia kaj interkonfesia amikeco estas sufiĉe gravaj kaj realaj celoj! Temas pri praktikado de vera kristaneco, kion ni faras ne nur por ni mem, sed anstataŭante por multaj, kiuj ne havas ĉi tiun eblecon, kiel kontribuo al la progreso de la Eklezio (do: ni!) en unueco kaj pliboniĝo.

Estas fakto, ke dum jarcentoj diversaj konfesioj restadis – se ne malamikaj – almenaŭ tute apartaj. En mia (katolika) urbo oni diris ke gepatroj batis siajn infanojn se ili eĉ nur scivoleme rigardis tra la fenestroj de la najbara evangeliana preĝejo... Malvasteco de koro, superstiĉo, ktp. Ekde la IIa Vatikana Koncilio komenciĝis malfermiĝo unu por la alia, intereso por la alia, komunaj preĝado kaj legado de Biblio, ktp. Ankoraŭ la kompreno de la Biblio en kelkaj punktoj estas tre malsama laŭ la diversaj konfesioj, kion ni plej forte kaj dolore konstatas en la "testamento" de Jesuo, la "Sankta Manĝo", kiun katolikoj kaj protestantoj ankoraŭ ne povas festi komune. La tiel nomata interkomuniado estas malpermesata kaj ankaŭ nek valora nek sincera, ĝis ni estos trovintaj en niaj komunaj kristanaj radikoj sufiĉe grandan interkonsenton, pri kio temas. Tiam ĝi iam ne plu estos temo de kverelado kaj malkonsento, sed mistero, donacita de Jesuo, kiun ni akceptas per unu sama fido, en unueco kun tiu de la apostoloj kaj de la fruaj ekleziaj teologoj. Tiel ni iam superos la kvereladon de unuopaj teologoj de la 16a jarcento! kverelado, kiu sen la politikaj kaj sociaj cirkonstancoj de tiu epoko neniel estus kaŭzinta longedaŭran disiĝon de la tuta Eklezio, "Korpo de Kristo" (laŭ 1 Kor 12, 12-31). Sed ĝis

tiam ni devus atendi kaj elteni la fendiĝon de la Eklezio, kvankam ni mem kiel unuopuloj eble jam forte strebas kaj sopiras al la venonta plena unueco, permesonta al ni komunan eŭkaristion. La Eklezioj nin instigas, fari kune ĉion kion ni jam povas: Kanti, preĝi, studi, diskuti, festi (kaj festeni...), kaj ĉion tion ni volas fari dum Bibliaj Tagoj en amika etoso, escepte de la partopreno en la manĝado fizika de la Sankta Manĝo laŭ la alia konfesio. Tamen estas bele, se ni spirite komunias al Jesuo, kaj respekte ĉeestas, kiam la aliaj komunias, tolerante ilian komprenon; kaj se ni spirite unuigas nin ankaŭ kun la fizike komuniantoj. La pli profunda senco de la Sankta Manĝo ja ne estas manĝado, sed unuiĝo.

Mi jam partoprenis bibliajn tagojn antaŭ apero de ADORU. La tagoj pasas kiel en malgranda ekumena kongreso. Ĉifoje mi estis post 2004 la duan fojon en Strasburgo.

Stefan Lepping lerte gvidis tra la tagoj. Li tre bone kantas kaj akompanas la kantojn per gitaro.

Unuan fojon mi partoprenis Rosarion. Impresis min ankaŭ “Kalvaria Vojo”, ADORU 20 kun kanto 021.

Patro Benoît Ente OP montris interesan kaj intertempe faman filmon “Homoj kaj Dioj”[1] (franclingva kun esperantaj surtekstoj)

Patro Willibald Kuhnigk OSB gvidis diservojn kaj prelegojn “Dio fariĝis homo” kaj “Dio elaĉetis nin”. Li citis multajn bibliajn lokojn, bedaŭrinde enmane ni ne havas resumon.

La ĉeeston de pastoro Wolfram Rohloff per protestanta Diservo kun Sankta Manĝo (ADORU 086) mi spertis kiel kulminon, ĉar ankaŭ kelkaj katolikoj sekvis la inviton de Jesuo.

Viktoro Simonnet estas juna franco, kiu estras la francajn IKUE-anojn. Ĉu la KELI-prezidanto konas lin? La patro de Viktoro estas akademiano ĉe UEA.

Giovanno Daminelli, estrarano de IKUE, ne estis kontaktema por paroli pri estonta ekumena kongreso.

La franco Emmanuel Wald, studento de protestanta teologio, gvidis la partoprenantojn tra Strasburgo.

La “Adoranto” Albrecht Kronenberger estis valora partoprenanto kaj ekumenano.


Li gvidis la ĉetablajn kantojn.

La daŭrigo de la bibliaj tagoj estas dezirinda. Danko estu al Stefan Lepping.

...

Fotogalerio pri kelkaj bibliaj tagoj, programo kaj partoprenintoj
www.ipernity.com/home/267574

[1] eo.wikipedia.org/wiki/Des_hommes_et_des_dieux_%28filmo%29



Dum prelego de patro Willibald Kunigh. Fotis K-H Schaeffer

# Informetoj

## “Kiom vi bezonas“

Venu al Hamburgo! Tie okazos la 34-a Germana Evangelia Eklezia Foiro (= Deutscher Evangelischer Kirchentag) de la unua ĝis la kvina de majo ĉijare. La biblia moto “Kiom vi bezonas“ (Exo 16,16) samtempe estu kuraĝigo kaj postulo. Unuflanke ĝi diras: Dio bonege prizorgas vin disponigante tiom, kiom vi bezonas. Aliflanke: Prenu por vi nur tiom, kiom vi bezonas. La moto rekte gvidas al la demandoj pri ĝusta kaj respondeca mastrumado, al la ĵusta disdonado de vivremedoj, aliro al klerigeco ktp.

Kiel kutime dum tiaj eventoj la Germana sekcio de KELI prizorgos informstandon kadre de la “Foiro de la Eblecoj“ (= Markt der Möglichkeiten). Ni troviĝos en la foira halo A1 kun la standnumero H17. La stando de KELI cetere ne estos la nura Esperanto-stando sur la “Foiro de la Eblecoj“. Partoprenos ankaŭ GEJ (= Germana Esperanto-




Junularo).

Mi tre ĝojas pri la engaĝigo de la Hamburganaj Esperantistoj. Jam lastan pentekoston dum la Germana Kongreso en Berlin la partoprenantoj el Hamburgo spontanee promesis sian kunlaboron. Intertempe la kunlaborteamo grandiĝis al ok personoj.

Venu al Hamburgo, vizitu nin, subtenu nin!

Hedwig Fischer,
sekretario de la
Germana KELI-sekcio

---

## Predikoj legeblaj ĉe nova retpaĝaro

Baldaŭ la esperantlingvaj predikoj de Bibliaj Tagoj (vidu apartajn raportojn) ankaŭ legeblos sur la retpaĝo de nia paroĥo. Do ĉe la retadreso www.kirche-in-zoeblitz.de vi trovos la predikojn de la Bibliaj Tagoj kaj de la pasinta KELI-kongreso.

Ni ankaŭ ĝojus, se legantoj komentus nian (esperantlingvan) paĝon kaj proponus aldonojn, plibonigojn k.t.p. aŭ per retmesaĝo aŭ rekte sur la paĝo je butono “Gästebuch”.

Kore salutas
Wolfram Rohloff

Faldfolio:

# Ĉetablaj Kantoj Kaj Preĝoj

Karaj, la partoprenintoj de KELI-kunvenoj kaj ekumenaj kongresoj havas ankoraŭ en siaj oreloj la vortojn de Adolf Burkhardt: "Ne forgesu vian duan haŭton!" Li parolis pri ADORU, kiun oni ĉiam kunportu.

Sed kien meti la libron post la antaŭmanĝa preĝo? Kiel protekti ĝin kontraŭ saŭco-makuloj?

Pro tio mi enretigis pdf-dosieron, helpe de kiu organizantoj de kunvenoj povas presi la bezonatajn faldfoliojn. Vidu ekzemplon sur la dorsa flanko

Oni povas elŝuti la dosieron el KRISTANAJ FONTOJ:
http://fontoj.net/ > kanti > Faldfolio: Ĉetablaj Kantoj Kaj Preĝoj
aŭ: http://fontoj.net/ > prepari Diservon > Faldfolio: Ĉetablaj Kantoj Kaj Preĝoj

Pro la kopi-rajtoj oni devas unue ensaluti per la pasvorto, havebla ĉe mi. Same oni skribu al mi, se oni preferas la dokumenton doc-forme por Microsoft Word:

Albrecht.kronenberger(ĉe)t-online.de

Kore salutas vin
Albrecht

---

# La malfondo de la finna sekcio de KELI

Bedaŭrinde mi devas informi al vi, ke nia kunsido decidis unuanime en marto 2012 kaj denove la 16-n de marto 2013 malfundi nian Sekcion.

Al la lasta kunsido alvenis tri membroj kaj unu, kiu ne apartenas ankoraŭ al iu kristana komunumo. Kelkaj kies sanstato malpermesas vojaĝojn sendis leteron, telefonis aŭ rete esprimis sian subtenon pro la malfondo. Mi informas en la landa revuo pri la afero kaj instigas homojn aboni Dia Regno kaj pagi subtenan membrokotizon al la konto ĉe UEA, same mi memorigis pri KELI-kongresoj. Niaj restantaj monrimedoj atendos en banko dum tri jaroj eventualan reaktivadon de la sekcio, poste ili iros al la konto de Esperanto Asocio de Finnlando laŭ la statuto.


La arkivo de Finna Sekcio de KELI estas en la Nacia Arkivo de Finnlando, krom la lastaj tri mapoj, kiuj detruiĝis dum la fumado kaj akvumado okaze de la ekbruliĝo de la poŝtkestoj en la loĝregiono, post la morto de prezidanto Olavi Kantele.

Synnöve Mynttinen
Rullakatu 6 as 11
15900 Lahti
Finnlando
synnove.mynttinen@phnet.fi

# ĈETABLAJ KANTOJ KAJ PREĜOJ

## 1

**ADORU 140**




2-voĉa aŭ 3-voĉa rondkanto
HALELUJA, AMEN • M, germana T kaj E (kiel ekzemplo): tradiciaj • 3a voĉo: Hermann Stern • AK 10 • kun afabla permeso de Hermann Stern